Baza vortlisto pri la temo ***urbo***

| | | | |
|---|---|---|---|
| **<u>En la urbo</u>**<br><br>loĝas iu<br>situas io<br>troviĝas io<br>troveblas<br>videblas io<br>vizitindas io<br><br>**<u>Kie?</u>**<br><br>norde de io<br>en la norda parto de io<br>sude de io<br>okcidente de io<br>oriente de io<br>meze de la urbo<br>(mal)dekstre de<br>proksime **al**<br>malproksime **de**<br>vid-al-vide al<br>laŭ la rivero<br>apud la hotelo<br>trans la monto<br>super la strato<br>je 5-minuta promeno | | **<u>Kio?</u>**<br>strato<br>sakstrato<br>placo<br>avenuo<br>bulvardo<br>domo<br>muzeo<br>banko<br>poŝtoficejo<br>fabriko<br>magazeno<br>butiko<br>lernejo<br>universitato<br>hospitalo<br>polikliniko<br>restoracio<br>kafejo<br>apoteko<br>kinejo<br>teatro<br>bushaltejo<br>tramhaltejo<br>koncertejo<br>naĝejo<br>tombejo<br>preĝejo<br>ludplaco<br>stadiono<br>taksistacio<br>policejo<br>urbodomo<br>vojaĝagentejo<br>hotelo<br>kampadejo<br>parko<br>rivero<br>ponto | |

Konsiloj pri la uzo de la vortolisto

La listo ne estas kompleta, eĉ ne vere ordigita, kreiĝis kiel spontana surpaperigo de la konceptoj pri la temo "urbo". Eblas ĝin uzi diversmaniere.

Antaŭ ol komenci la prilaboradon de la koncerna (kaj fakte kiu ajn leksika temo) estas bone doni kelkajn minutojn al la lernantoj por ke ili mem, skribe kolektu la jam konatajn vortojn, kiuj rilatas al la temo.
La kolektitajn vortojn ili unu post la alia povas laŭtlegi ankaŭ en formo de ludo/konkurso.

a) Ĉiu laŭtlegas unu vorton, esprimon kaj se iu alia havas la saman, la laŭtleginto ne ricevas poenton, se li/ŝi estas la sola kiu havas la esprimon, ricevu poenton.
b) La lernantoj laŭtlegas unu post la alia kaj tiu venkas kiu diras la lastan vorton. Ripeto ne permesatu!

La liston kiun vi trovas en la lerniloteko, vi povas doni kiel komencan paŝon de la studhoro, kaj la lernantoj povas aŭ legi en si mem, aŭ en duopoj/triopoj pritrakti kiujn vortojn ili konas, kiuj estas nekonataj. La liberaj kolumnoj donas eblon skribi la nacilingvajn ekvivalentojn. Post ĉiu parto restas libera spaco por aldoni proprajn vortojn, esprimojn.

Eblas ankaŭ ordigi la liston laŭ similaj esprimoj: konstruaĵoj, institucioj, veturiloj, stratoj, ktp.

La liston oni povas doni ankaŭ fine de la leciono kiel lernindaĵon, hejmtaskon.